

10 jaroj de Esperanto-muzeo en Svitavy

Inter la tagoj 14-16 de septembro 2018 nia Esperanto-muzeo en Svitavy festis sian dekjariĝon. Venis proksimume 40 personoj, inter ili ankaŭ gastoj el Slovakio kaj Hungario (gvidata de László Szilvási). En la slovaka grupo de Peter Baláž kaj Jano Vajs estis ankaŭ franca volontulino Salome Hug.

La programo komenciĝis vendrede je la 19-a horo per solena inaŭguro de nova ekspozicio omaĝe ne nur al la 10-jariĝo de la muzeo, sed samtempe ankaŭ omaĝe al la 100-jariĝo de nia ŝtato. La ĉefa aranĝanto estis Pavla Dvořáková. La ĉeestantojn bonvenigis ĈEA-prezidantino Libuše Hýblová kaj transdonis la vorton al Pavla Dvořáková, kiu priskribis la jubileojn, poste ŝi invitis Vlastimil Kočvara, kiu rememoris la junularan agadon en la 1950-aj jaroj, precipe somerajn kursojn kaj tendarojn. Alia memoranto estis Pavel Polnický, kiu montris plurajn historiajn fotojn de la 1960-aj jaroj, listojn kaj leterojn. Fine prezentis sian agadon Peter Baláž, kiu ankaŭ alportis grandan libroservon kun multaj interesaj libroj.

Sabata programo komenciĝis je la 9-a horo en la supra salono kun ĉeesto de la urbestro de Svitavy, s-ro David Šimek, kaj la direktorino de la Urba Muzeo kaj Galerio Blanka Čuhelová. Ĉar en la salono estis gastoj kiuj ne komprenis ĉeĥe kaj aliaj, kiuj ne komprenis Esperanton, necesis la paroladojn interpreti (M. Malovec). Peter Baláž rakontis pri la situacio en Slovakio kaj envio, ke ni ĉeĥoj havas muzeon kaj arkivon, kiuj al ili mankas. Aliflanke ili trovis interesan prelegon de Albert Škarvan, la unua slovaka esperantisto. Kopion de la prelego li donacis al la muzeo kaj donacen al la urbestro. La urbestro disdonis florojn al la lokaj klubaninoj, kiuj plej multe meritis pri la fondiĝo de la muzeo kaj poste devis foriri por edzigi plurajn gefianĉojn.

Petr Chrdle priskribis la staton de Esperanto-biblioteko post 1990, kiam ĈEA pro 20-obla kresko de luprezo devis forlasi la ĉambrojn en Jilská kaj la Praga klubo en Vejvodova post angulo, en kiuj troviĝis la biblioteko de Jaroslav Šustr (parte en Jilská, parte en Vejvodova). Komence helpis Ivo železný, sed ankaŭ li havis problemojn, do la biblioteko trovis provizoran protekton en diversaj lokoj, ĝis fine ĝin akceptis Jiří Pištora, direktoro de urba muzeo en Česká Třebová, kie la kolekto estas ĝis nun. Sed sole por esploristoj, ne estas eksponita por la publiko. Tial oni provis trovi eksponejon en Svitavy. Blanka Čuhelová priskribis la situacion antaŭ pli ol dek jaroj, kiam ŝi kun Libuše Dvořáková serĉis en Svitavy taŭgan domon, sed nur kiam la Ottendorer-biblioteko venis sub la administron de la urba muzeo, en la teretaĝo ili trovis taŭgan spacon. Ĝi estis en ruina stato, necesis multe da laboro de lokaj klubanoj kaj helpis ankaŭ mono parte de la ministerio de kulturo kaj parte de Esperanto Studies Foundation en Usono. Estis prezentitaj fotoj kaj video pri la festa inaŭguro. Libuše Dvořáková menciis gravajn eventojn, kiuj okazis en la muzeo dum la pasinta jardeko, signifajn vizitantojn. Petro Chrdle klarigis, kiel oni povas trovi en lia retejo de KAVA-PECH Esperanto-librojn. Estis disdonitaj donacetoj al homoj, kiuj laboris en la muzeo, unue al lokanoj, poste al eksteraj helpantoj.

Tagmanĝo en la restoracio Astra ĉe la busa stacio apenaŭ finiĝis kaj jam alveturis mendita buso, kiu transportis la partoprenantojn al Moravská Třebová, konkrete al la muzeo kun ekspozicio pri samurajaj glavoj kaj mumio de egipta princino kaj al la kastelo kun historiaj membroj, pentraĵoj kaj eĉ kavalira kiraso, kiu aspektis kiel infana grandeco, ĉar la mezepokanoj estis je kapo malpli altaj ol ni. Samvespere ankoraŭ koncertis la grupo Noproblem el Kostelec na Hané, alterne ĉeĥe kaj esperante, post vespermanĝo en Astra oni daŭrigis programon en nia muzeo (en teretaĝo) per komuna kantado.

Dimanĉa matena programo estis dediĉita al muzea seminario. Pavla Dvořáková parolis pri Esperanto en la 1930-aj jaroj, Vlastimil Kočvara priskribis la tiutempan situacion en Silezio kaj Jan Vajs parolis pri ĉeĥaj esperantistoj, kiuj laboris en Slovakio kaj grave helpis al la tiama slovaka Esperanto-movado. Miroslav Malovec koncize prezentis interesaĵojn, kiujn oni trovis dum ciferecigado de bultenoj en la 1950-aj jaroj, konkrete pri harpisto Václav klička, ornitologo Zdeněk Klůz, operkantisto Zdeněk Švěhla, kiu faris gramofondisko pri Vendita fianĉino, kaj fine pri marista vivo de Vlado Sládeček. Mária Pilková parolis pri ĝemeliĝo inter la urboj Jihlava kaj Martin kaj Vladimír Türk klarigis laboron per programo ABBY. Fine László Szilvási priskribis fondiĝon de

Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko en la reto kaj ĝiajn problemojn.

Miroslav Malovec,
Brno la 16-an de septembro 2018, Brno